

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Okazis

La Jarkunveno 2026

En la 1a de februaro, la 2026-a Jarkunveno de Neprofitcela Organizo Esperanto-Jokohama havis lokon en sia oficejo, nome la Esperanto-Muzeo Jokohama. El la 41 membroj, tie efektive venis 11 membroj, kaj kun 8 perleteraj voĉoj kaj 7 voĉoj komisiitaj, ĉiuj proponoj estis aprobitaj:

- (1) la jarraporto por 2025 kaj la agadplano por 2026,
- (2) la kasraporto por 2025 kaj buĝeto por 2026,
- (3) reguligo de membrokotizaj rabatoj: precipe 80-jarulo aŭ pli aĝa rajtas je duonigo de la jara kotizo, nome al 3000 enoj.
- (4) aldono de la sepa komitatano : s-ro Kijonaga Ĵoota.

Okazos

Sakuraj floroj prezentaj kun pendlanternoj

Borde de la Rivero Oooka, ankaŭ ĉi-jare estos prezento de sakuraj floroj, kun pendlanternoj lumigitaj vespere : de la 21a de marto ĝis la 5a de aprilo. Nia rondo ofertas 6 lanternojn kun nia nomo aŭ slogano.

Hama-Ronda Tago, 29a de marto

En Esperanto-Muzeo Jokohama, de 15:30 ĝis 7:30 de la 29a de marto, ni okazigos Hama-Rondan Tagon kun jena enhavo. Poste oni libervole aliĝu al prezento de sakuroj (vidu supre).

- (1) Pri ĉi-jara UK en Aŭstrio
- (2) «Kanto de Hama-Rondo», laŭ uklela akompano
- (3) Nova libro «Fantomrakontoj» de Lafcadio Hearn, kaj deklamado el la libro.



La Jar-kajero 2025-a, de Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama

Jen estas la skizo de la ĉefaj eventoj en la antaŭa jaro 2025.

noto: [MZ] estas por Esperanto-Muzeo Jokohama. [IR] por interreto. < > por la n-ro de tiu ĉi gazeto, enhavanta artikolon pri tiu afero.

*feb. 2 [MZ] : La Jarkunveno de nia rondo, kun

aprobo de la antaŭjara raporto kaj kaso, de ĉi-jara plano kaj buĝeto, kaj aldono de s-ro Sugita Naoja al la estraranoj. Kiel revizoro, demisiis Murata Kazuyo kaj enoficiĝis Kurobara Aliza.

*feb. 4 [MZ] : Vizitis nin s-ino Tamara (Park Haesim) kaj ŝia edzo el Koreio.

*feb. 17 : Forpasis s-ro Makino Micuo (nask.

1930), nia membro.

*mar. 7 [IR] la 134a legokunsido, pri “Abismoj” de Jean Forge, kun 5 personoj. <n-ro 406>

*mar. 21 - apr. 6 [Riverbordo de Rivero Oooka]: Estis Festenado pro apreci sakurajn florojn laŭborde de Rivero Oooka, kun pendlanternoj por prilumi sakurojn vespere. Al tio ni oferdonis 7 lanternojn kun nia nomo.



*apr. 20 [MZ]: Hama-Ronda Tago, kun 21 partoprenantoj. Speciale temis Historio de japana Esperanto-Movado. <n-ro 407>.

*maj. 4 [MZ]: Vizitis nin s-ro Thierry Spanjaard el Francio. <n-ro 408>

*maj. 10: Forpasis s-ino Kosino Motoko (nask. 1941), nia membro.

*maj. 28, jun. 2 kaj jul. 17 [MZ]: Vizitis nin s-ro Giacomo Comincini el Italio. <n-ro 408, 409>

*jun. 6 [IR]: la 135a legokunsido, pri la libroj elektitaj mem, kun 5 personoj. <n-ro 409>

*jun. 28-29 [Esperanto-Domo de Jacugatake]: Tranokta seminario en la seminariejo de JEI. Partoprenis 5. <n-ro 409>

*jul. 26-aŭg. 2 [Brno, Ĉeĥio]: La 110an UK partoprenis nia membro Namba Fumiharu.

*aŭg. 9-16 [Cisarua, Indonezio]: La 81an IJK partoprenis nia membro Suzuki Keiichiro.

*sept. 5 [IR]: la 136a legokunsido, pri “Printempa teruro” de Julian Modest, kun 4 personoj. <n-roj 411>

*sept. 7 [MZ]: Prezento de spertoj de niaj membroj. Estis 10 prezentoj, kaj venis 12. <n-ro 411>

*sept. 15 [MZ]: Vizitis nin ges-roj Kleemann el Germanio kaj la Kantoduo Kajto el Nederlando.

*sept. 20-22 [Okayama]: La 11a Azia-Oceania Kongreso kaj la 112a Japana Esperanto-Kongreso okazis, kaj kelkaj membroj ĉeestis. S-ro Sibayama Zyun’iti ricevis la Premion Ossaka. <n-ro 412>

*okt. 13 [MZ]: Vizitis nin ges-roj Boguslau Ubik-Perski kaj Katja el Germanio.

*okt. 14: Forpasis s-ino Miyagawa Masako (nask. 1939), nia membro.

*nov. 2 [MZ]: Okazis Gratula Kunveno al s-ro Sibayama Zyun’iti pro la Premio Ossaka, per 10 personoj.

*nov. 7 [MZ]: Vizitis nin s-ro Cho Sung Ho el Koreio.

*nov. 29-30 [Earth-Plaza en Jokohamo]: Kun E-Societo de Kawasaki, partoprenis en Earth Festa Kanagawa, kaj informadis pri Esperanto. <n-ro 413>

*dec. 13 [Maĉida] La 55a Zamenhof-Festo de Kanagawa prenis lokon en urbo Maĉida kun tiea grupo. Entute 22 personoj, kaj 12 el nia rondo. <n-ro 414>

sezonvorto februara


trablov-vento 隙間風

Okita Kazumi

En japanaj domoj, eĉ se la konstruado ne estas malbona kaj la fendoj estas fermitaj per *mebari*^(*), akra malvarma aero povas enblovi tra la interspacoj de pordoj kaj ŝoĵioj.

Tion oni nomas trablov-vento. Male al vento kiu rekte frapas la korpon, ĝi atingas la kolon aŭ la nukon kaj donas subitan, frostotreman senton.

*fermitaj per *mebari* = ŝtopgluitaj



eseo

“Dondo-yaki”, fajro-festo por la fino de novjaraj festotagoj

Namba Fumiharu

Novjaraj festotagoj en Japanio estas longaj. Antaŭ kelkaj tagoj ol la novjariĝo, t.e. jarfinaj tagoj, homoj metas novjarajn ornamaĵojn ĉe la pordoj de domoj. Por granda pordego (se vi havas) grandaj *Kadomatsu* estas metataj,

kaj por normalaj pordoj de enirejoj oni surmetas malgrandajn ornamaĵojn. Post la festotagoj, oni formetas tiujn ornamaĵojn por komenci nefestajn kutimajn tagojn. La preciza dato por formeto varias tra Japanio, kaj en regiono Kantoo inkluzive de Jokohamo la dato estas la 11a de januaro.

Same kiel multaj tradiciaj kutimoj, la kialoj kaj signifoj de tiuj novjaraj ornamaĵoj estas forgesitaj por multaj homoj. Tamen, kiam mi aĉetis mian ornamaĵon en fama butikoj MUJI, troviĝis la klarigo jene.

Novjaraj ornamaĵoj estas signoj por gastigi kamion* *Toshigami-sama* kiu gardas la vizititan hejmon dum la tuta jaro. La ornamaĵo funkcias kiel barilo evitigi malpurajn aĵojn, kaj pretigas la domon kiel sanktan ejon kie la kamio povas resti trankvile.

Nun, post la novjara ferio, kiel oni traktas uzitajn ornamaĵojn? La festo “Dondo-yaki” estas okazigata por bruligi tiujn ornamaĵojn por preĝi dumjaran sanon kaj pacon. Antaŭtempe, oni rostis moĉion (kukon farita de rizo) per tiu fajro kaj manĝis, pro la kredo ke ĝi havas bonŝancan forton. Tamen nuntempe, tokseco per fumo de brulado estas vaste konata, kaj tiu rostado estas ofte evitita.

Ni, Esperanto Jokohama ankaŭ metis novjaran ornamaĵon sur la pordo de nia Esperanto-Muzeo Jokohama dum la novjaraj tagoj. Kaj poste ni kunportis la ornamaĵon al “Dondo-yaki” okazigita en najbara marborda parko.

*kamio: diversaj dioj de ŝintoismo, japana politeisma religio



Kiel farita estas tiu ĉi organo?

Ni ricevis demandon pri tiu ĉi "Novaĵoj Tamtamas" de franca samideano, kaj ni respondis. Jene estas ties resumo.

(DEMANDOJ)

Estimataj Geamikoj,

Unue mi deziras esprimi mian sinceran dankon, nome de nia asocio Esperanto Liono (el Francio), pro la regula sendado de via monata asocia bulteno. Estas por ni ĉiam granda plezuro ricevi vian gazeton, kaj la papera versio aldonas plian ĉarmon.

Se vi bonvolas permesi, mi ŝatus fari kelkajn demandojn pri la papera eldono de via bulteno, ĉefe por lerni el via sperto.

Kiom da ekzempleroj vi entute sendas? Al kiuj homoj/asocioj ĝi estas sendata: ĉu nur al eksterlandaj ricevantoj, aŭ ankaŭ al membroj de via asocio? Aliaj asocioj en via bela lando?

Ĉu vi povus diri, laŭ via sperto, kian koston tio entute reprezentas?

Ĉu vi uzas apartan presilon aŭ servon por la presado?

Ni tre aprezas vian elekton daŭrigi la paperan eldonon; ĉu vi bonvolus klarigi, kiaj estis la motivoj aŭ konsideroj malantaŭ tiu decido?

Sincere, Sinjoro Marc-Olivier GRAZIANI de Esperanto Lyon

(RESPONDOJ)

Dankon pro via interesiĝo pri nia bulteno. Sibayama Zyun'iti, la ĉefredaktoro respondas.

*Kiom da ekzempleroj, sendataj al kiuj?

Ni Esperanto Jokohama ĉiumonate eldonas du bultenojn, nome

(1) "La Tamtamo", preskaŭ japanlingva, 6 ĝis 8 paĝoj

(2) "Novaĵoj Tamtamas", esperantlingva, 4 paĝoj.

Ni sendas (1) kaj (2) al niaj ĉ. 40 membroj, kaj al ĉefaj japanaj Esperantaj grupoj, paperpoŝte, aŭ rete.

Ni sendas (2) al ĉ. 30 eksterlandaj abonantoj paperpoŝte kaj al ĉ. 20 eksterlandaj abonantoj rete. Ni rekomendas retan abonon, sed volonte sendas papere al dezirantoj. Fakte papera sendo bezonas poŝtan tarifton, egalvaloran al ĉ. 1 eŭro al eŭropaj landoj.

*Kiel fari bultenon

1. redaktado: La kolektitajn artikolojn redaktas gazetoforme s-ino Sibayama Noriko.
2. presado: Presas per laser-printilo s-ro Doi Hirokaz en sia hejmo, kaj portas la presaĵon al Esperanto-Muzeo.
3. papera sendado: Unu fojon monate (krom aŭgusto), kelkaj volontuloj faldas la presitajn foliojn kaj enmetas en koverton. La kovertojn ni portas al poŝtofacejo por sendado.
4. reta sendado: Al retaj abonantoj, ni sendas pdf-e.

*La nuna principo : Ni petas laŭeble retan abonon, sed papero restas i.a. al personoj kaj grupoj kiuj ŝatas/bezonas paperan version.

la unua paĝo de "La Tamtamo", februaro 2026 ➡

La Tamtamo

587号 2026年2月号

1/12

La Tamtamo

第587号
2026年2月号

NPO 法人エスペラントよこはま会報 共同会誌 info@esperanto.yokohama

2026年度会員総会を開催
2月1日14時～16時半に、エスペラント博物館よこはまにて、2026年度のNPO法人エスペラントよこはまの会員総会が開催され、全4議案が可決された。
総会参加者は、会員41名中、実参加11名、書面賛決8名、委任状7名(全て議長あて)の計26名で、定足数を満たした。議長は宮崎英子、書記は荒井和博が執手にて承認された。
・議案1: 2025年度報告と2026年度計画。会報1月号同時の案を一部詳細化したものが提示され、全賛賛成で可決。p.4-7参照。
・議案2: 2025年度決算と2026年度予算。1月31日に監事の鈴木恵一朗さんが監査して承認された案が提示され、全賛賛成で可決。p.9-12参照。
・議案3: 全賛賛成に関する補助規程の制定。会費割引で、昨年決めた青年割引などを定式化するとともに、高齢者割引を新設。賛成25名、保留1名で可決。p.7参照。
・議案4: 役員人事で、理事として清水文太さんを増員。賛成25名、保留1名で可決。p.7参照。
・その他の話: 主な内容は、p.8参照。

Hama-Ronda Tago 開催
3月29日(日)15:30-17:30に、エスペラント博物館よこはまにて開催します。その後、有志は「みなみ桜まつり」(右記)の建物へ
現在計画中の番組は、①今年のオーストラリアの世界エスペラント大会(西渡文晴)、②Kanto de Hama-Rondoのウクレレ演奏会(宮崎英子)、③新刊の「Fantomrakontoj」(ラフカディオ・ハーン)の「怪談」17編のエッセイについての話(徳山純一)と、その「怪談」からの語り・・・皆様から募集します。本は3EJ出版で2300円＋税。

「みなみ桜まつり」に協賛
今年も、南区内の大岡川プロムナード(観音橋～清水橋)の間で桜のライトアップを行う「さくらまつり」に、当会から6灯の名入りのぼんぼりを贈ります。3月21日(土)～4月5日(日)で、点灯は夜の6～9時です。今年はパンフレットに広げられます。
協賛のご寄付をお願いします。一口5千円、それ以下でも!

Esperanto
Jokohama

■発行所: NPO法人エスペラントよこはま ■編集: 徳山純一、荒井和博 ■印刷: 徳山純子
■連絡先: 郵便物 〒232-0072 横浜市南区永田1-19-1 NPO 法人エスペラントよこはま
■ホームページ: <http://www.esperanto.yokohama/> ■電子版アドレス: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp
■年費: 6,000円 ■会報年費: 3,000円(エスペラント会報「Novaĵoj Tamtamas」内)
■郵便振替口座: 00220-7-55214 NPO 法人エスペラントよこはま
■ゆうちょ銀行 〇二九店(ゼロ二キヨウ店) 当座 55214 トクハ エスペラントヨコハマ